

Kritika komento:

Kial Esperanto ne estis kaj ne estos deklarita kiel nemateria kulturheredaĵo de Svislando

Naivaj esperoj kaj troa entuziasmo de svisaj esperantistoj finiĝis en administra fiasko:

La propono de M. Grosjean rilate la akcepton de Esperanto kiel nemateria kulturheredaĵo de Svislando ne trovis aprobon de la svisaj instancoj

En la aprila numero de *Esperanto* (UEA) Mireille Grosjean utiligis preskaŭ unu tutan kaj vanan paĝon por abunde skribi pri la temo de la mondaj heredaĵoj de Unesko (kiuj eĉ ne koncernas Esperanton) kaj por diskonigi al la legantoj kun granda bruo sian projekton de la akceptigo de Esperanto kiel nemateria heredaĵo de Svislando, afero evidente ligita kun grandega espero. Ŝi referencis al analoga projekto en Pollando, kiu havis sukceson kaj estis aprobita en 2014 de la tiea ministro pri kulturo. Analogan ekzercon Grosjean, volis, nome de Svisa Esperanto-Societo (kun sidejo en La Chaux-de-Fonds), konduki al sukceso ankaŭ en Svislando en 2016/17, tra la kantono Neuchâtel. Kiel ŝi notis en la koncerna artikolo, tiu ĉi kantono eĉ konfirmis, ke ĝi akceptis la proponon de SES (kiel reprezentanto de la ĝenerala civilsocia publiko, kiu rajtas fari tiajn proponojn), kaj ke ĝi plusendis ĝin al la centra administracio en Berno, kiu devis decidi en la nomo de Svislando.

En julio 2017 la koncerna administracio (Svisa oficejo pri kulturo kadre de la Ministerio de la internaj aferoj) publikigis la aktualan (kaj definitivan) liston de la nuna aktualigo sub <http://www.bak.admin.ch/kulturerbe/04335/04341/05708/index.html?lang=de>. Videble, Esperanto mankas en tiu ĉi listo (kiel mi anticipe prave supozis, ĉar la propono de SES ne konformis al la kriterioj).

Laŭ demando de mia flanko de la 20a de septembro 2017, la koncerna administracio respondis la postan tagon, ke la propono de SES ne povis esti akceptita, ĉar ĝi efektive ne konformis al la kriterioj de Unesko (laŭ art. 2 de la koncerna konvencio), kiu ne konsideras lingvojn en si mem kiel nemateriajn kulturheredaĵojn. Kiel la kunlaboranto de tiu administracio (Svisa oficejo pri kulturo) aldone klarigis, lingvoj ja povas en escepta kazo esti akceptitaj kiel nemateria heredaĵo, se ili estas litigitaj kun specifaj parolaj tradicioj kaj popolaj esprimformoj aŭ kiam lingvo funkcias kiel portanto de specifa popola kant- aŭ rakont-tradicio. Similaj kriterioj, konsideroj kaj argumentoj evidente ludis iun rolon en la pola kazo, dum ili evidente ne funkciis en Svislando. Oni klarigis al mi, ke en Svislando ekzemple ankaŭ la retoromanĉa lingvo kiel tia ne estas konsiderebla kiel nemateria kulturheredaĵo.

Do, ŝajnas, ke la svisaj (neuŝatelaj) iniciatoroj de tiu propono unue ne ĝuste komprenis la esencon de nemateria kulturheredaĵo laŭ la kompreno de Unesko, due ili blindigis sin per la kazo de Pollando (kie la propono estis akceptita en laŭ mi iom dubinda maniero, vd. http://www.plansprachen.ch/Esperanto_Polen.pdf, p. 182-85.), kaj trie ili pravigis ĝin ĉe la svisaj aŭtoritatoj per maltrafaj argumentoj. En la koncerna artikolo de *Esperanto* oni povis legi jenan pravigon: „Svisa Esperanto-Societo (SES), kies sidejo estas en La Chaux-de-Fonds, en la kantono Neuchâtel, proponis Esperanton al la kantona registaro. Argumentoj estis ne nur la sidejo de SES, sed ankaŭ la elstara kontribuo de du svisoj, Edmond Privat kaj Hector Hodler, en la vivo de nia Movado.“ Oni ne komprenas, kial Edmond Privat kaj Hector Hodler, cetere ambaŭ ĝisostaj ĝenevanoj, ludu iun rolon lige kun la nemateria heredaĵo en la senco de Unesko, kaj eĉ ne koncernas la kantonon Neuchâtel mem (kvankam Privat iam loĝis kaj agadis en tiu ĉi kantono kaj la fondo de KCE laŭdire estis inspirita de li). Do, el la vidpunkto de la decidanta komisiono, tiaj kriterioj devis esti interpretitaj komplete malkonforme al art. 2 de la koncerna konvencio de Unesko. Ankaŭ la fakto, ke la formala sidejo de SES troviĝas en La Chaux-de-Fonds, ne sufiĉas kiel decida argumento (cetere, antaŭe ĝi troviĝis dum longa tempo en aliaj kantonoj, depende de la loĝloko de la oficanta prezidanto, poste ĉio koncentriĝis en La Chaux-de-Fonds resp. Les Brenets per la persona akaparado de la „povo“ fare de s-

ino Grosjean, kiu diktas la tonon en tiu asocio). Eĉ ne estas klare, ĉu KCE kaj CDELI estis menciitaj en la koncerna letero (ĉar tiu informo mankas en la koncerna artikolo de *Esperanto*), kio estas iom stranga kaj nekompleta.

Post la fiasko de la instruista konferenco, kiun Grosjean pompe anoncis kaj efektivigis en Neuchâtel antaŭ du jaroj, kiu estis esence partoprenata de esperantistoj, sed okazis sen la kunvokitaj diplomatoj, la malaprobo de Esperanto kiel nemateria kulturheredaĵo de Svislando estas la dua granda fiasko de tiu (tro) fervora Esperanto-aktivulino, kiu sisteme troigas la povojn kaj fortojn de Esperanto kaj super-taksas la proprajn eblojn. Sed tiaj malsukcesoj tute ne malhelpas ŝian popularecon en la Esperantomovado, kiu estas granda. Krom tio, la rifuzo de la propono aprobi Esperanton kiel nemateria kulturheredaĵo de Svislando estas granda bato por la movado, kiu strebas atingi, ke Esperanto iam estu akceptita kiel monda kulturheredaĵo de Unesko, se ankoraŭ aliaj landoj aliĝos al tiu propono.

Kiel oni cetere povis legi en la artikolo de Grosjean, la kantono Neuchâtel sendis ankoraŭ tri aliajn proponojn al Berno. Finfine, anstataŭ Esperanto, estis elektita nur la propono de la popola tradicio de *per neĝo formitaj figuroj sur la stratoj de la urbo La Chaux-de-Fonds* (vd. <http://www.arcinfo.ch/photos/regions/les-sculptures-de-neige-envahissent-la-chaux-de-fonds-390952>). Jen tio estas vere vivanta kulturtradicio en la senco de Unesko, kompare kun Esperanto, kiu estas (almenaŭ en Svislando elmortanta) lingvo kaj movado, kiu nek en la socia vivo de la kantono Neuchâtel nek en Svislando ankoraŭ ludas iun gravan rolon.

Al s-ino Grosjean oni do povas konsili, ke estonte ŝi konsultu taŭgajn personojn, kiuj povas kompetente konsili ŝin, se temas pri la lanĉo de grava iniciato, kiu koncernas la prezentadon de Esperanto al la „ekstera mondo“ kadre de similaj konkursoj. En alia kazo la totala fiasko estas garantiata, kiel montris la plej aktuala kazo. Por la iniciatoroj tamen restas la konsolo, ke almenaŭ la kantono Neuchâtel, kiu regule subtenas/is la ideojn de esperantistoj en sia teritorio, bonvolis akcepti ilian proponon kaj plusendis ĝin al Berno, kvankam la koncerna ŝtata komisiono decidis negative. Ili do povas esti kontentaj pri tiu simbola „kompromiso“, kiu esprimas certan aprezan valortakson de Esperanto en tiu „esperanta“ kantono (kiu eĉ portas la verdan koloron en sia flago), en kiu verŝajne nur malmultaj homoj scias, kio estas Esperanto. KCE ne plu funkcias kiel „grava“ Esperanto-institucio en tiu kantono, kaj la sorto de CDELI, kiu same estis iniciato de privatuloj, ne estas certa. La kantono Neuchâtel kaj la urbo La Chaux-de-Fonds, kiuj suferegas pro manko de monaj rimedoj por financi siajn publikajn aferojn, do neniel garantias la plukezistadon de tiuj kaj tiaj privataj iniciatoj kaj institucioj, kiuj nur malofte estas utiligataj de la ĝenerala publiko. Necesas do konsideri tiujn realeaĵojn.

La melodio de la koncerna germanlingva teksto estas jena:

Auskunft des Bundesamts für Kultur (Bern) vom 21.9.2017 (auf Anfrage von A. Künzli vom 20.9.): „Es ist tatsächlich so, dass «Esperanto» als Eintrag für die Liste der lebendigen Traditionen der Schweiz vorgeschlagen wurde. Der Vorschlag wurde bei der Aktualisierung der Schweizer Liste deshalb nicht berücksichtigt, weil gemäss dem UNESCO-Verständnis (Art. 2 des Übereinkommen zur Bewahrung des immateriellen Kulturerbes) Sprachen an sich für die Listen des immateriellen Kulturerbes nicht berücksichtigt werden sollen, bzw. sich ein Eintrag in den Inventaren nur dann rechtfertigt, wenn es sich um spezifische mündlich überlieferte Traditionen und Ausdrucksweisen oder um Sprache als Träger immateriellen Kulturerbes (in Form von spezifischem Liedgut, Sagentraditionen, etc.) geht. Sie können sich vorstellen, dass andernfalls von Baskisch bis Rätoromanisch alle Sprachen der Welt einen Eintrag in die Liste für sich beanspruchen würden.“

aK, sept. 2017

www.planlingvoj.ch

(Kvankam ĉi tiu komunikado estis sendita al pluraj Esperanto-gazetoj, neniu el ili publikigis ĝin).